

Fenikso

Revuo de Esperanto Nederland

25a jarkolekto • n-ro 6 | novembro - decembro 2020



**Rinus Loof-van
Overmeeren pri
akvoplantoj kaj ranoj**

**Nekrologoj de Hylke Bron
kaj Bob Venhuizen**

Kajto gajnis la duan premion

**Lerni Esperanton donas
avantaĝojn**

**La 7-an de novembro
virtuala renkontiĝo**

**La 21-an de novembro
virtuala studo-
posttagmezo**

13

Strangulo
en propra lando

18

Prezentado en
Zutphen

23

Gebruik je moerstaal
en Esperanto

**Tijd om de Esperanto
tulp te planten**

**Koncerto en
kronvirusa
tempo**




Fenikso Forumo de Esperanto Nederland

Dumonata membrogazeto de Esperanto Nederland
ISSN 1384-6515

Membroj de Esperanto Nederland ricevas la gazeton.
La jara kotizo estas € 35,-
(por samdomanoj €12,50).
NEJ-anoj pagas € 15,-
(por samdomanoj € 5,-).

Fenikso estas aparte abonebla nur por ne-membroj en eksterlando.
La tarifo estas € 20,-.
Vidhandikapitoj povas ricevi kasedan version de Rob Moerbeek, vidu dekstre.

Kunlaborantoj de Fenikso:

Ĉefredaktoro: Foppe-Klaas Hovinga
Redaktoro: Andries Hovinga
Korektantoj: Marc Konijnenberg kaj Bert de Wit
Konsilanto: Ineke Emmelkamp
 Redakcio@esperanto-nederland.nl

Limdato:

Materialo por la sekva numero estas bonvena ĝis la 1a de decembro 2020.

Informoj pri Esperanto:

Ineke Emmelkamp
Arubastraat 12, 9715 RW Groningen
(info@esperanto-nederland.nl)
tel.050-5718842

Studie-weekeinde:

studosemajnfino@esperanto-nederland.nl.

Esperanto Nederland enrete:

Retejo: <https://www.esperanto-nederland.nl>
Fejsbuko: facebook.com/esperanto.nederland
Telegramo: <https://t.me/EsperantoNederland>
Tvitero: <https://twitter.com/esperantonl>

Sendu viajn respondojn al:

redakcio@esperanto-nederland.nl
Respondu al artikoloj per maksimume 200 vortoj.
La redakcio decidas ĉu publikigi tekstojn aŭ ne.

Estraro

- **Estraro:** estraro@esperanto-nederland.nl

- **Prezidanto:** Said Mozaffari Baluchi,
(prezidanto@esperanto-nederland.nl)
tel. 06 84316394

- **Sekretario:** Ineke Emmelkamp,
Arubastraat 12, 9715 RW, Groningen
(sekretario@esperanto-nederland.nl)

- **Kasisto:** Loes Demmendaal,
Duikerlaan 160, 2903 AC,
Capelle a/d IJssel.
(kasisto@esperanto-nederland.nl)
tel.010 2133320

- **Estrarano:** (i.a. pri instruadaj aferoj):
Rob Moerbeek,
Zwaansmeerstraat 48, 1946 AE, Beverwijk.
(rob.moerbeek@esperanto-nederland.nl)
tel.0251 231079

- **Estrarano:** Andries Hovinga,
De Fennen 47, 8918 CC,
Leeuwarden, tel.06 28916262
(andries.hovinga@esperanto-nederland.nl)

- **Pri sociaj komunikiloj:**
(sociaj-komunikiloj@esperanto-nederland.nl)

- **Membro-administranto:**
Koos Scharroo,
Vaartweg 24G, 8382 EB, Frederiksoord
(membroj@esperanto-nederland.nl)
tel.06 22413267

Bv. informi pri (ŝanĝoj de) poŝtadreso,
telefonnumero, retpoŝtadreso, (eks- kaj
ali)membriĝo, pagmaniero

Bankkonto:

IBAN: NL 10 TRIO 0786 8441 67
nome de Esperanto Nederland,
Capelle aan den IJssel.

Eventueel retouradres:

Esperanto Nederland Ledenadministratie
Vaartweg 24G
8382 EB Frederiksoord

En tiu ĉi numero

4. Mallongaĵoj
5. Renkontiĝoj, studo-posttagmezo nuligita. Luminesk
6. Reagoj de legantoj
8. Membroj, Rinus Loof van Overmeeren
9. Koncerto en kronvirusa tempo
10. Nekrologoj de Hylke Bron kaj Bob Venhuizen
11. Studotago de NGGE
12. De la estraro
13. Strangulo en propra lando
14. Esperanto tulp
16. Nieuwsgroep <esped> is verhuisd
17. Vortserĉenigmo
18. Prezento pri Esperanto en Zutphen
20. Kajto gajnis premion, kant-video kaj manifesto
21. Libroj, PMEG kaj persa kurso
22. Rezultoj jarfinaj en IZO
23. Gebruik je moerstaal en Esperanto
24. Roterdamo 2020
25. Medito sur la meditoserio pri Zamenhof
26. Farbado, Lerni Esperanton donas al ni avantaĝojn
27. Senpaga
28. Esperanto Studieweekend 2021

Amsterdama Rondo

“La Amsterdama Rondo” organizas kunvenojn de esperantistoj - ĉiun duan dimanĉon en la monato. Nun ni renkontiĝas virtuale. En novembro Federico Gobbo gvidos la kunvenon de la Amsterdama Rondo pri libroj. Ĉiuj estas bonvenaj.

Organizanto: laamsterdamarondo@gmail.com.
+31 614 240 870 (Peter) +31 23 5242 643 (Bert)
Vidu: <http://amsterdamo.nl>

Antaŭparolo

Sabaton, la 16-an de majo 2015, homoj el Nederlando kaj Belgio kunvenis en la socia kultura centro ‘De Klamaere’ en la frisa urbeto Workum. - Mi konis nur Gerda Dercks el Almelo. - Por tiu tago ni formis la kunkantantan koruson de Kajto. Ankie van der Meer kaj Nanne Kalma akompanis nin per muzikinstrumentoj, Ankie kondukadis. Antaŭe ili sendis la tekstojn kaj kantojn al ni. Ni neniam antaŭe kantis kune, sed estis kantemaj. Post kelkfoja ekzercado, ili registris la kantojn. Pro unu el tiuj kantoj, ‘La Tubo’, Ankie kaj Nanne nun gajnis premion.

Pieter Engwirda donis prezentadon al grupo de maljunuloj de la ‘Derde Fase’ (Tria Aĝo), kiam ankoraŭ eblis, kaj Bert de Wit partoprenis koncerton. - Kiom longe la teatroj, koncertejoj kaj aliaj amuzejoj povos persisti en siaj aktivaĵoj? - Por ni, esperantistoj, ankaŭ estas malfacile kunveni. La estraro kaj laborgrupo kiu organizas la studsemajnfinojn luktis pri la demando ĉu kaj kiel ni povus kunveni. Finfine ili decidis organizi virtualan renkontiĝon. Ke tio eblas kaj povas esti amuza, tion ni jam povis sperti dum la lastaj monatoj. Mi mem kunvenis en la Amsterdama Rondo (vidu maldekstre), kaj en la Esperanta koncerto de Nanne Kalma kaj Ankie van der Meer.

Ne ĉiuj ŝatas kunveni per virtualaj kongresoj. Se vi estas unu el ili, vi povus planti esperantajn tulipajn bulbojn en la ĝardenon aŭ en florpoton sur la balkono. Feliĉe, ekzistas ankaŭ multaj aliaj Esperantaj farendaĵoj, interrete kaj eksterrete. Interrete vi povus rigardi meditojn de Federico Gobbo kaj legi novaĵojn. Eksterrete vi povus mergi vin en la novan libron PMEG pri la Esperanta gramatiko. Eble vi trovos interesan libron inter la senpagaj libroj (ekskl. de sendokostoj). Ĉu vi deziras verki? Ni alvokas vin dividi kun ni viajn dezirojn por 2021 kaj viajn spertojn. Espereble tiu ĉi Fenikso ankaŭ donas al vi ĝuon kaj malstreĉiĝon. Kaj espereble niaj venontaj studsemajnfino kaj Universala Kongreso 2021 en Belfasto denove estos fizikaj.

Ni deziras al vi ĝuplenan legadon.

Foppe-Klaas Hovinga
Ĉefredaktoro

Foto sur la kovrilo

Rinus Loof-van Overmeeren uit Almere schreef ons een brief waarin hij iets over zichzelf en zijn tuin schrijft. Deze brief kun je verderop in het blad lezen.

We stellen het erg op prijs wanneer we e-mails krijgen en wanneer iemand iets over zichzelf vertelt. Daarmee leren we elkaar kennen. In deze tijd is het toch lastig elkaar in levenden lijve te ontmoeten.

Esperanto gedenkplaat in Zwolle gerepareerd

De Esperanto-gedenkplaat aan de Zamenhofrotonde in Zwolle staat weer op zijn plek. Het muurtje waarop de plaquette is bevestigd was door midden gebroken. Inmiddels zijn de twee muur-helften weer aan elkaar verankerd en is de plaat, met daarop afgebeeld Doktoro Esperanto, weer bevestigd.

Zamenhof is door de Amsterdamse School beeldhouwer Frits Sieger op de gedenkplaat afgebeeld.

Zamenhofsingel. Het is niet het enige monument van de Doktoro in Zwolle, ook aan de Burgemeester Drijbersingel, voor theater De Spiegel, staat een gedenkteken. Vroeger herinnerde ook de naam van de straat aan Zamenhof. Gedurende 42 jaar heeft de singel, voor de gedenkplaat, zo geheten, tot het gemeentebestuur in 2001 besloot de Zamenhofsingel om te dopen in

Burgemeester Drijbersingel. De Esperantovereniging heeft destijds ook uitgebreid geprotesteerd tegen de naamsverandering. Dit heeft er wel toe geleid dat Zwolle een Zamenhofrotonde heeft gekregen, op de plaats waar Rembrandtlaan – Burg. Drijbersingel – Dijkstraat en Schuttevaerkade bij elkaar komen.

Bron: <https://www.rtvfocuszwolle.nl>



Simon Smits in de krant van Zeeland

In de PZC, Provinciale Zeeuwse Courant, legt Simon Smits een interview af over het Esperanto. In het interview pleit hij met groot enthousiasme voor het gebruik van het Esperanto. Bovenaan het artikel staat dan ook: "Iedereen zou Esperanto moeten spreken".

Simon Smits vertelt dat door het Engels het teveel over Amerika gaat. Tot de jaren zestig waren er allerlei Esperantoclubs in Zeeland actief. Simon Smits geeft aan: "Het is mijn overtuiging dat Esperanto een goede zaak is voor heel de wereld, zeker in deze tijd, met alle internationale contacten." Omdat hij wil dat meer mensen Esperanto leren, gaat hij een cursus geven. Hij is daarvoor vooral op zoek naar jonge mensen.

Bron: <https://www.pzc.nl/zeeuws-nieuws/iedereen-zou-esperanto-moeten-spreken~a39ec3ee/>

RISKO

De Ineke Emmelkamp



Ofte mi ludas RISKO-n de la retejo Edukado.net. Ĉu vi konas ĝin? Ne estas facile atingi la unuan lokon de tiu ĉi kleriga ludo. Multajn demandojn mi devis respondi. Kaj ĉiun tagon! Finfine, en septembro 2020 mi atingis la unuan lokon. Mi gajnis! Jen mia okupo dum la kronvirusa tempo!

<https://edukado.net/ludoj>

Sur paĝo 7 vi trovos iom da klarigo pri RISKO.

gravuristo	8	23	
kamich	9	21	1
ineke	12	31	9
betul	8	22	8
webklaas	12	34	8
jmatty2000	11	23	7
hosszu	11	22	7
tata	6	16	6

Gajninto je 2020-09

21 november studiemiddag

Esperanto

Karaj partoprenantoj,

Per ĉi tiu mesaĝo ni volas informi vin pri la studo-
posttagmezo planita por la 21-a de novembro.

Kiam ni komencis la organizadon, la kronviroza
situacio estis serioza sed regebla. Sed intertempe
ĝi bedaŭrinde multe pligraviĝis. La ejo kiun ni
rezervis situas en la plej forte trafata regiono de
Nederlando, nome Nov-Okcidenta Amsterdamo. La
estraro de la ejo enkondukis devigan uzadon de
vizaĝmaskoj.

Restas iom da tempo, kaj estas tro frue por
definitiva decido. Tamen ni jam volas averti vin: se
ne videblas klara pliboniĝo kvar semajnojn antaŭ la
kunveno, nia opinio estus senrespondece vojaĝigi
homojn al Amsterdamo. Tiuokaze ni ne havos alian
elekton ol nuligi ankaŭ la studoposttagmezon.

Ni tenos vin informitaj. Restu sanaj!

Amike,
Arjen-Sjoerd de Vries kaj Ineke Emmelkamp
studosemajnfino@esperanto-nederland.nl

Nederlands

Beste deelnemers,

Hierbij willen we jullie bijpraten over de studiemiddag
die gepland staat voor 21 november.

Toen we begonnen met de organisatie hiervan, was
de Corona-situatie wel ernstig, maar onder controle.
Maar sindsdien is deze helaas flink verslechterd. Het
gebouw dat we hebben besproken ligt in het zwaarst
getroffen gebied van Nederland, namelijk Amsterdam
Nieuw-West. Het bestuur van het gebouw heeft het
gebruik van mondmaskers verplicht gesteld.

We hebben nog even en het is te vroeg voor een
definitieve beslissing. Toch willen we jullie alvast
laten weten: als er vier weken voor de bijeenkomst
geen duidelijke verbetering zichtbaar is, zou het naar
onze mening onverantwoord zijn om mensen naar
Amsterdam te laten reizen. In dat geval hebben we
geen andere keus dan ook de studiemiddag te
annuleren. We houden jullie op de hoogte. Blijf
gezond!

Hartelijke groet,
Arjen-Sjoerd de Vries en Ineke Emmelkamp
studosemajnfino@esperanto-nederland.nl



Luminesk

La Silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio.

Ĝi nun okazos la sesan fojon kaj fariĝis posteulo de
la iamaj "Internaciaj Festivaloj" private organizitaj.
Ankaŭ ĉi-foje ĝi ofertas varian kaj altkvalitan
programon – lingvokurson, prelegojn kaj
diskutgrupojn, ekskursojn kaj distrajn programerojn.
Partoprenantoj kutime venas el 7-8 landoj.

Kotizo: 439 €, inkluzivas
la restadon, tri manĝojn
tage, programon kaj
silvestran bufedon.

Kronviroza

"Ni estas optimismaj ke
LUMINESK povos okazi
kiel nun planite. En la
kazo ke ni devos nuligi
la aranĝon pro la
kronviroza situacio, ni
repagos la kompletan
antaŭpagon aŭ jam
pagitan kotizon."

La loko estas atingebla per aŭtoŝoseo kaj pli favore per la IC de Kolonjo aŭ
Hamburgo. Ĝi situas en bela pejzaĝo de la ebena "Münsterland". La arkovojo
ĉe la vendoplaco 'Prinzpalmarkt' estas vidinda, same la katedralo 'Dom' kaj
la urbodomo, kie la "vestfalia paco" estis sigelita. La multaj studentoj ankaŭ
troviĝas sur la vojo de la urba muro, kiu konektas la diversajn urbopartojn
ringforme, kompreneble per biciklo, en loka dialekto "leze".

Estingo-Ribelo pri Civitana Interkonsiliĝo

Ni ricevis de Rob Moerbeek el Beverwijk la jenan reagon al la artikolo *Extinction Rebellion*.

Post artikolo en "Fenikso" mi ĉeestis kunvenon pri civitana interkonsiliĝo sur la Muzea Placo en Amsterdamo, la 19-an de septembro 2020.

En mondo kun nemultaj optimume funkciantaj demokratioj jam foje montris sian utilon t.n. civitanaj konsiliĝoj. Niaj politikistoj dependas de elektorezultoj, emas tro promesi kaj ne ĉiam kapablas realisme reprezenti la interesojn de la popolo, mem influeblaj de internaciaj entreprenegoj (genmanipulaj, farmaciaj kontraŭ-naturkuracaj...) kaj pri tiklaj problemoj ne atingas indan progreson. Kelkaj parlamentanoj do en stagnosituacio iniciatas civitanan konsiliĝon, pli aŭtentan ol momentaj, ne-informbazitaj popol-enketoj. Akompanate de fakuloj, "blinde" elektitaj reprezentantoj de ĉiuj grupoj en la socio ricevas celkonformajn fidindajn informojn kaj spacon (eble bitan) por en pluraj renkontiĝoj pripensi la diversajn solvoproponojn de grava problemoj kaj eble ellabori alternativojn, por ke rezultu decido kun la akceptitaj proponoj, transdonotaj al la iniciatinto(j). Anticipe estu garantio, ke la petinta instanco (parlamento, registaro, urba konsilio aŭ magistrato...) akordu, se 65, aŭ eble 80% de la reprezentantoj voĉdonis por la propono.

En eksterlando jam funkcias la sistemo, kun hominde gravaj decidoj (pri klimato en Francio, aborto en Irlando, kontraŭ akcepto de eksterlanda nuklea rubo en Aŭstralio... Tamen nia registaro

neglektis publike transdonitan civitanan proponon.) Mia opinio gravas por la asertata travidebleco de la procezo, ke oni videe registru la interkonsiliĝojn kaj disponigu la samajn kontroleblajn informojn ankaŭ al la ceteraj interesatoj ne mem partoprenantaj en la popola interkonsiliĝo. Al sia propra gruporepresentanto ili povu sciigi sian opinion aŭ alternativan ideon.

Laŭ broŝureto "Burgerberaad: de noodzakelijke update van onze democratie", eld. De Burgerberaad-cirkel van Extinction Rebellion Nederland. (Civitana interkonsiliĝo – aktualigo de nia demokratio. Rondo de Civitana interkonsiliĝo de (la angla) <kontraŭ>estinga ribelo en Nederlando.)

David van Reybroeck: Tegen verkiezingen (Kontraŭ elektoj), 2003. Ĝuste tion oni substrekis: ne estas la celo subfosi la demokratiajn instancojn, male subteni ilin per la popola voĉo.

Inter 8 retartikoloj:

Bas Mesters: Een cadeau aan de politiek.

Burgerpanels denken mee met de overheid, 2020 (Donaco al la politiko. Civitanaj forumoj kulpensas kun la aŭtoritatoj.)

Entute impresis min la optimisma, optimismiga freŝa prezento de junaj homoj.

Rob Moerbeek

Korektoj de Simon Smits

De Simon Smits ni ricevis jenan retmesaĝon.

Estimataj samideanoj,

Dankon pro la novaĵo pri mia elekto kiel prezidanto de la fondaĵo "Taalverdediging". Sed la loko kie mi loĝas nomiĝas 's-Heerenhoek. Kaj sur la sama paĝo, supre mi vidas kiel loko

"Noorddorp", sed tio devas esti "Nootdorp" (apud Zoetermeer). Mi ne konas lokon "Noorddorp".

Altestime.

Simon Smits, 's- Heerenhoek

Reago de la redakcio

Dankon Simon Smits pro via korektoj.



RISKO

La ludo celas klerigi la ludantojn pri kulturo, lingvo kaj movado de Esperanto. En la ludo estas starigitaj tri demandoj pri tiuj tri temoj. La demandoj estas ligitaj al Esperanto.

Eblas ludi unu fojon tage.

Ĉiutage estos starigitaj tri demandoj pri Esperanto: po unu pri lingvo, kulturo kaj movado. Nur tiuj, kiuj bone respondis al almenaŭ unu el la du unuaj demandoj, rajtos elekti halti aŭ pluludi kun la ŝanco duobligi la poentojn aŭ perdi ilin.

Spertoj rilate al Esperanto

De Francina C. Reibestein- v.d. Does.

Estimataj sinjoroj Hovinga,

Vi demandis en la revuo, ĉu personoj volos rakonti ion pri siaj spertoj rilate al Esperanto.

Mi promenas jam dum jaroj en proksima parko kaj ofte mi marŝis laŭlonge de latbarileto kun jena surskribo: "Esperanto Wereldtaal". Sed mi neniam serĉis informon pri tio. Ĝis septembro 2019. Mi ne scias, pro kio mi tiam estis scivola.

Irinte hejmen mi serĉis kelkajn informojn en interreto. Mi trovis la kurson de s-rino Wil van Ganswijk kaj ŝia filo, <https://wvganswk.home.xs4all.nl>, kaj s-ro Koos Scharroo, www.pingveno.nl.

Lastmenciita kurso estas alternativa, ilustrita versio de tiu de s-rino van Ganswijk. Samtage mi lernis la unuan lecionon el la kurso de s-rino Wil van Ganswijk. Ĉi tiu kurso estas tre agrabla per memkorekto, ekzercoj kaj klara ekspliko.

Ĉiutage mi lernis entuziasme. Mi estas 75 jara kaj mi opiniis, ke mi ne plu lernos novan lingvon. Sed Esperanto estas klara, logika kaj bela lingvo kaj mi ŝatas lerni ĝin. Helpe de la kurso kaj la senpaga libro "Esperanto Grammatica" de s-roj



RISKO! Se vi respondos bone la trian demandon viaj poentoj duobligiĝos, sed se vi respondos malĝuste, vi perdos la poentojn gajnitajn en tiu tago! Viaj poentoj sumiĝos ĉiumonate, kaj fine de la monato ni lotumas premion inter tiuj, kun la plej altaj poentoj. Estos plia premio por la absoluta gajninto de la tuta jaro. La gajninto rajtos elekti unu el la premioj el nia Premio-paĝo.



Haveman kaj De Vries mi provis studi pli pri Esperanto. Nun s-rino van Ganswijk kaj mi korespondas kune. Tre agrable kaj estas tre bona metodo por lerni novan lingvon. Kelkajn librojn ŝi sendis al mi kaj mi ankaŭ aĉetis librojn en Esperanto. Mi volonte legas la librojn de la verkisto Julian Modest kaj Ronald C. Gates. Bedaŭrinde, ke mi ne estas sufiĉe sana por partopreni kunvenojn kaj aliajn agrablajn kursojn. Sed mi faras mian eblon por legi Fenikso-n kaj mi volonte reagos je demandoj, se eblas. Tiumaniere mi kontribuas ion, ĉu ne?

Kore mi salutas vin,
Francina C. Reibestein- v.d. Does.

Bonvenon!

Al mi plaĉas verki tiun ĉi rubrikon por Fenikso. Denove mi povas mencii ke ni havas du novajn membrojn.

- Richard Meijer el Spijkenisse aliĝis al nia asocio.
- Alia membro loĝas proksime de Roterdamo. Ŝi preferas ne publikigi sian nomon kaj urbon.

Estas vere bedaŭrinde ke ni nun ne facile povas konatiĝi kun novaj membroj. Mi esperas ke en la jaro 2021 ni povas konatiĝi kun ili! Kaj kun la aliaj novaj membroj.

Fartu bone.

Ineke Emmelkamp, sekretario de Esperanto Nederland. – sekretario@esperanto-nederland.nl



Rinus Loof-van Overmeeren

Mia nomo estas Rinus Loof-van Overmeeren. Mi estas nova membro de Esperanto Nederland. Mi loĝas en Almere. Mi studas Esperanton ekde duona jaro. Mi studas kaj per Duolingo kaj per lernu.net. Kompreneble mi aŭskultas Muzaiiko-n. Laŭ mi Esperanto estas belega lingvo por arto. Mi ofte provas skribi poemojn en Esperanto. Speciale hajkojn mi ŝatas.

Mi fieras pri mia ĝardeno. Kontraŭe al tiu de miaj najbaroj ĝi estas verda kun multaj plantoj, arbustoj kaj arboj. En la ĝardeno estas arka tegmento (overkapping). Mi ofte sidas tie, kaj ĝuas la silenton kaj pacon. Mi ankaŭ ŝatas rigardi la birdojn kiuj ĉiam



flugas inter la arbustoj kaj arboj. En la ĝardeno estas lageto kiu estas farita el kuvo por fari cementon. Antaŭ du jaroj mi metis teron en ĝin kaj akvoplantojn el fosaĵo proksima. Nun ĝi estas biotopo por libeloj kaj ranoj. La lageto estas kovrita per lemno (kroos).

Loĝas tri ranoj en la lageto. Ĉiufoje kiam mi estas en la ĝardeno mi rigardas en la lageton por vidi la ranojn. Kelkfoje mi aŭdis plaŭdon, kelkfoje mi vidas unu, du aŭ ĉiujn ranojn. Ofte mi vidas nenium.

La ranoj por mi estas simbolo de paco, silento kaj vivo en mia ĝardeno. Ili estas inspiro por sekva poemo (hajko).

*La ranoj ĉiam estas;
se ne vidita,
tamen en mia sento.*





Koncerto en kronvirotempo

De Bert de Wit

Renesancan aŭ Barokan muzikon mi tre ŝatas. Mi kantas eĉ en renesanca ensemblo. Mi sufiĉe ofte aĉetas biletojn por la sabata posttagmeza muzika programo ("Matinee") en la koncertejo en Amsterdamo. Belega muziko kaj ofte eminentaj kantistoj. Ankaŭ en junio mi aĉetis biletojn por koncertoj („malnova muziko“) en sabataj posttagmezoj. Mi pensis ke mi bone aranĝis la aferon ĝis mi ricevis leteron en julio ke ĉiuj koncertoj estas nuligitaj kaj ke oni povos denove aĉeti biletojn en aŭgusto. La mono pagita antaŭe por la koncertoj estas uzebla tiucele.

La 17-an de aŭgusto mi sukcesis akiri biletojn per interreta konekto. Ĉar mi promesis al Saskia Veen en la marta kunveno de la Amsterdama Rondo ke ŝi ricevos bileton por koncerto en la koncertejo, mi invitis ŝin al la koncerto de la 26-an de septembro, dum kiu oni prezentos "Reĝo Arturo" de Henry Purcell, famkonatan operon barokan. Eble vi ankaŭ konas kelkajn melodiojn el tiu opero, kiel "Kiom benitaj la paŝtistoj, kiel feliĉaj iliaj amikinoj" aŭ "Plej bela insulo". Mi foje kantis ilin sub la gvido de mia kantinstruistino.

La koncerto estis tute adaptita al la kronvirotempo. Oni ne havas rezervitajn sidlokojn, junulo lokas vin en sufiĉa distanco de aliaj personoj. Inter la vicoj estas spaco en kiu oni metis tablon, sur kiun oni povas meti siajn trinkaĵojn. La trinkaĵojn oni prenu antaŭe post la eniro de la konstruaĵo. La programlibrojn oni same prenu senpage. La vestaĵojn kaj sakon oni kunprenu en la salonon, ne funkcias la vestogardado. Ankaŭ ne estas paŭzo. Pro tio oni rajtas kunporti du trinkaĵojn samtempe. La programistoj de la koncerto antaŭe skribis ke en la koncertejo oni daŭre refreŝigas la aeron, tiel ke oni ne timu ke oni enspiros eventuale kontaĝitajn aerosolojn.

La origine planitaj orkestro kaj solkantistoj ne povis veni al Amsterdamo, ĉar ankaŭ en Britio la kronvirotempo malebligas multon. Do, ĉi-foje estis orkestro de la nederlanda Bach (Baĥ)-asocio kaj kantistoj de la ensemblo Vox Luminis kiuj prezentis la operon. Kaj oni kantis kompreneble en distanco de pli ol 1,5 metroj. La spektaklo estis ĝuinda kaj la muzika prezento bona. Post la prezento, la publiko ne ekstaris por aplaŭdi kaj ankaŭ ne rajtis ĝojkrii. Simple oni sidu aplaŭdante. Kelkaj homoj aplaŭdis ankaŭ per siaj piedoj. Poste oni en iom-post-ioma maniero iris al la elirejo. Ĉar estis longa sidado, mi tuj iris al la necesejo. Saskia povis ankoraŭ elteni ĝis ŝi atingis la hejmon. Estis aparta sperto, tiu koncerto en kronvirotempo. Koncerto adaptita al la situacio, tiel ke oni povas daŭre ĝui kulturon. Bonege ke oni daŭrigas, ankaŭ en malfacila situacio!



Hylke Bron

27 aŭgusto 1928 - 28 aŭgusto 2020

La 28-an de aŭgusto 2020 forpasis nia frislanda ano Hylke Bron el Leeuwarden. Regule li partoprenis en Esperanto studsemajnfinoj, sola aŭ kun sia filino Erna, kiu, ho ve, mortis antaŭ kelkaj jaroj. Antaŭ du jaroj li regule vizitis la festivalon Lân van Taal en Leeuwarden, kie Esperantistoj havis budon. Li iris tien per sia elektra trirada biciklo kun la filo Siebe.

En 2005 li ĉeestis kun Erna internacian kongreson en Boulogne sur Mer, ekde tie ili faris ekskurson al Dover, same kiel Zamenhof faris en 1905. Li ŝatis legi Esperanto-librojn kaj ofte li aŭskultis Esperanto-radio-elsendojn. Lasttempe li havis apartamenton en loĝejo por maljunuloj kaj ŝatis esti zorgata tie.

Ho ve! Li dum kelkaj semajnoj pro kronviruso ne rajtis akcepti geamikojn. Eĉ la sola filo tiam ne rajtis viziti sian patron. Feliĉe li ne havis la malsanon koronan. Nur mallonge li sentis sin malsana.

Li forpasis fakte neatendite la 28-an de aŭgusto 2020, unu tagon post lia 92-a naskiĝdatreveno.

Hylke estis ano de Esperanto Noord-Nederland kaj de Esperanto Nederland. Nomo de ambaŭ unuiĝoj Wil van Ganswijk parolis dum la adiaŭa solenaĵo en Goutum, kie ankaŭ Ineke Emmelkamp kaj Andries Hovinga ĉeestis.

La parolanto dum la solenaĵo plurfoje menciis lian Esperanto-vivon. Hylke forte subtenis la Eŭropan movadon. Ni aŭdis la Esperanto-version de la Eŭropa himno, kaj kiel lasta muzika parto ni aŭdis la Esperanto-himnon. La lastaj vortoj estis: ke li restu en paco.

Li restu en niaj memoroj kiel fidela kaj simpatia esperantisto.

Wil van Ganswijk.

Bob Venhuizen

9 april 1957 - 26 september 2020

Bob naskiĝis en la urbo Groningen. En la sepdekaj jaroj li lernis Esperanton kaj fariĝis aktiva membro de UJE, Unuiĝo de Junaj Esperantistoj en Groningen. La grupo tiam estis aktiva kaj aranĝis kunvenojn kun junaj esperantistoj en Nord-Germanio. Li ankaŭ aktivis en NEJ - Nederlanda Esperanto Junularo kaj partoprenis multajn semajnfinojn. Bob plurfoje ĉeestis la laborgrupon kiu prizorgis la tradukon de la unua Esperanta Asterikso. Bob estis estrarano de TEJO pri kongresoj (1979-1981) komitatano de UEA (1983-1986 kaj

1989-1990) kaj membro de la financa komisiono de UEA (1983-1986 kaj 1998-2001). En la jaro 1984 dum IJK en Britio nederlandaj junuloj priparolis la neceson ke la nederlandaj Esperanto-asocioj kunfandiĝu. Bob poste fariĝis prezidanto de NEA dum Loes Demmendaal estis la prezidanto de FLE. Ambaŭ pledis en siaj asocioj por la fondo de Esperanto Nederland kiu efektiviĝis en 1994.

Profesie li dediĉis sin al la bonfarto de luantoj, estante direktoro de Woonplus, korporacio en Schiedam. Li edziĝis al esperantistino, nia longjara membro Annemarie Roode.

Ni kondolencas Annemarie, la filon Jasper kaj bofilinon Alana.

Kompilis Loes Demmendaal



Studotago de NGGE

De Rob Moerbeek

Novembreze NGGE esperas kunveni ĉe UEA (Nieuwe Binnenweg 176, Roterdamo). Tie povos ĉeesti ĝis 6 personoj en sekura distanco. Ĝis nun dum la Studotago ni bonvenigis du ĝis kvar partoprenantojn, sed certe nun utilas aliĝi per e-mesaĝo al moerbeekr@gmail.com.

La programon povos decidi la ĉeestantoj: elekto aŭ kombino eblas el: lingvaj demandoj; listoj de evitendaj kaj arkaikiĝintaj vortoj en PIV de 2005 (nur ĉ. 650 eroj), malpli longa listo de misoj en PIV (parte riparitaj en la nova eldono de 2020) kaj kompreneble la novaj verkoj de Petro Desmet (De Smedt): "Esprimoj" kaj nun "PIVido", la vasta vortaro Esperanto-nederlanda.

Sed ni almenaŭ enrigardu la ĵusan libron, eldonitan en Usono kun la beno de UEA: **"Gvidilo al la 17 Celoj por Daŭripova Evoluigo (iniciate de Unuiĝintaj Nacioj"**, kun tekstoj de Renato Corsetti pri malriĉo, Heidi Goes pri malsato... pri edukado kaj ĉies eblo daŭre kleriĝi, de Mark Fettes,... Paco kaj justeco de Ulrich Brandenburg kaj laste, plej moŝte Humphrey Tonkin pri la necesaj partnerecoj por komune solvi la aliajn 16 urĝaĵojn.

Tamen atenton meritas ankaŭ nova eldono de "Baza Literatura Krestomatio", kiu ambicias aktualigon por nia kultura kompetento per "minimuma legolisto": ĉ. 200 tekstoj de 82 aŭtoroj, el kiuj 23 novaj ekde 1986. Mi ĵus rekomencis, ĝuante ne nur arkaismojn, kun danko al la antaŭa redaktoro Vilmos Benczik kaj la nuna Aleksander Korĵenkov!

Gvidilo

al la

17 CELOJ POR DAŬRIPOVA EVOLUIGO

de Unuiĝintaj Nacioj

1 NENIU MALRIĈO 	2 NULA MALSATO 	3 BONA SANO KAJ BONFARTO 	4 BONKVALITA EDUKADO 
5 SEKSA EGALECO 	6 PURA AKVO KAJ HIGIENO 	7 PAGEBLA KAJ PURA ENERGIO 	8 BONA LABORO KAJ EKONOMIA KRESKO 
9 INDUSTRIO, INVENTEMO, INFRASTRUKTURTO 	10 REDUKTI MALEGALECON 	11 DAŬRIPOVAJ URBOJ KAJ KOMUNUMOJ 	12 RESPONDECAJ KONSUMO KAJ PRODUKTO 
13 KLIMATA AGADO 	14 SUBAKVA VIVO 	15 SURTERA VIVO 	16 PACO, JUSTO, FORTAJ INSTITUCIOJ 
17 PARTNERECOJ POR LA CELOJ 			

Eldonita en kunlaboro kun
Universala Esperanto-Asocio

Virtuala renkontiĝo kaj estraranoj

Karaj membroj,

La temoj de tiu ĉi rubriko estas:

- ne fizika jarkunveno, sed virtuala renkontiĝo
- ŝercataj novaj estraranoj kaj kunlaborantoj



Virtuala renkontiĝo

Dum la someraj monatoj ni esperis ke ni povos okazigi jarkunvenon, la 7-an de novembro, en Utrecht. Ni estis tro optimismaj.

La situacio rilate al la kronviruso fariĝis pli severa dum la lastaj tagoj kaj ni devis decidi nuligi la fizikan kunvenon. Virtuala jarkunveno ne estas tiel facile organizebla. Kiamaniere oni povas voĉdoni anonime? Ĉu virtuala jarkunveno estas jure akceptebla? Multaj demandoj pri tia kunveno. Ni decidis ŝovi ĝin al la jaro 2021, esperante ke tiam la viruso ne plu tiel multe ĝenos nin.

Sed ekestas alia ideo. Nun ni decidus organizi virtualan renkontiĝon por havi kontakton

kun niaj membroj kaj kun tiuj kiuj interesiĝas pri la asocio Esperanto Nederland.

La virtuala renkontiĝo okazos la 7-an de novembro pere de Zoom. Ni komencos je la 13.30a ĝis maksimume la 16.30a h. Eble ni finos pli frue. Multe dependas de la nombro da partoprenantoj kaj la interparoloj kaj lanĉitaj ideoj. Se vi deziras partopreni al tiu ĉi virtuala renkontiĝo bonvolu kontakti min. Mi sciigos al vi la ligilon de la renkontiĝo.

En Fenikso nr. 2/2020 estis publikigita '[Beleidsplan 2020-2025](#)'. Kion vi opinias pri ĝi? Kiamaniere vi povas fari kontribuon al la laboro de Esperanto Nederland?

Novaj estraranoj kaj kunlaborantoj serĉataj

Prezidanto serĉata

Ni serĉas novan prezidanton! Said Baluĉi forlasos la estraron, la unuan de januaro 2021. Nun ne okazos elekto pri nova prezidanto, se ja eblas jam nun anonci sin kaj eklabori en la estraro.

Kion faras prezidanto?

- Prezidanto prenas la iniciaton kaj gardas la diversajn projektojn.
- Prezidanto gvidas la jarkunvenojn kaj estarajn kunsidojn. Kelkfoje estas alia homo kiu gvidas la kunvenojn kiel unutaga prezidanto.
- Vi gvidas la estraron kaj iniciatas kaj kunordigas la diversajn taskojn.
- Vi prezentas la asocion dum internaciaj, naciaj kaj eksteraj kontaktoj.

En la agadplano (Beleidsplan) vi legos la planojn kiujn ni havos por la venontaj jaroj. Vidu: **[Fenikso 2, jaro 2020](#)**

Estraraj kunsidoj okazos en Utrecht. Aŭ en venontaj monatoj virtuale.

Sekretario serĉata

En majo 2021: La sekretario Ineke Emmelkamp, demisios dum la jarkunveno, kiu espereble povas okazi en majo 2021.

Kion faras sekretario?

- Tiu ĉi estrarano prizorgas ĉiujn sekretariajn procezojn de la asocio. Vi organizas la estrarkunsidojn, faras la raportojn, ekz. agadraporton.
- Atentas pri la listo de farindaj/farendaj taskoj, respondas al plej diversaj petoj kiuj alvenas poŝte aŭ rete. Nun Esperanto Nederland havas protokolanton por la estrarkunvenoj kaj jarkunvenoj.
- Vi povas akurate labori kaj povas uzi la programojn Excel, Word kaj similajn programojn.

>

Aliaj kunlaborantoj:

Se vi ankoraŭ ne certas ĉu al vi plaĉas esti sekretario, vi estas bonvena ĉeesti plurfoje la estrarkunsidojn. Ankaŭ se vi havas spertojn pri aliaj taskoj, kiel ekzemple teknikajn spertojn pri virtuala kunvenado, fari filmetojn kaj/aŭ prezentojn por la retejo kaj Facebook, vi povas proponi vin kiel estraron.

Ĉu vi konas iun kiu povus esti prezidanto, sekretario aŭ eventuale estrarano kun speciala tasko? Se vi konas iun kiu ŝatus esti estrarano aŭ kunlaboranto, sed ne kuraĝas proponi sin mem?

Vi povas proponi ŝin/lin/rin al la sekretario: sekretario@esperanto-nederland.nl, 050-5718842. Demandoj estas ankaŭ bonvenaj.

Kun koraj salutoj,
Ineke Emmelkamp, sekretario Esperanto Nederland
sekretario@esperanto-nederland.nl, 050-5718842



Revuo-interŝanĝo de Alfonso Pijnacker

Alfonso Pijnacker legas recivitajn Esperantajn gazetojn el la tuta mondo. Pri la plej legindaj artikoloj li skribas en Fenikso kaj se iu interesiĝas pri iu artikolo li sendos la skanitan artikolon. Bedaŭrinde ĉifoje li ne ricevis gazetojn. Se vi havas abonon al revuo, bonvolu, kontaktu Alfonso por ke li povu legi la revuon. Lia retpoŝtadreso: a.pijnacker@simpc.nl.

Strangulo en propra lando

En la revuo *Grazia* la publicisto Sujet Chams skribis pri la angliĝo de la urba vivo. Ŝi rimarkas, ke en la kafejo oni ofte ne komprenas ŝin kiam ŝi parolas la nederlandan. Ŝi ricevas arogantan mienon, kiam ŝi daŭre parolas la nederlandan.

Sujet Chams vidas, ke la angla progresas. En la medio kaj sociaj retoj oni uzas anglajn vortojn. University of Twente uzas la anglan kiel ĉefan lingvon, ne nur en la lecionoj, sed ankaŭ dum kunvenoj kaj en politikaj paperoj oni nun uzas la anglan. Sujet Chams pensas, ke tio estas malĝusta.

Pri la uzado de la angla Sujet Chams skribas la sekvan: "Ni devas komuniki kun la eksterlando, kaj tion ni faras en la angla. Sed tio ne signifas, ke ĝi devas preni la lokon de la originala lingvo. Same kiel la angla ligas je internacia nivelo, tiel la

nederlanda ligas je nacia nivelo." Plejparte la homoj kun malmulte da edukado estos la viktimoj. "Imagu, ke vi estas iu kun malmulte da edukado kaj pro tio vi ne parolas la anglan, kaj en iu kazo vi ne povas pagi uzante la nederlandan. Tiam vi sentas vin ega strangulo en via propra lando."

Sujet Chams ne konsentas kun la homoj, kiuj pensas ke la angla ne venkos la nederlandan, se ni ne protektas aktive la nederlandan. Ke la University of Twente ŝanĝis sian ĉefan lingvon al la angla, tion ja pravas.

Fonto: *Grazia*, artikelo "Engels is minder chique en charmant dan Nederlands"

<https://twitter.com/SujetShams/status/1291766819439742988?s=20>

Esperanto Tulp

Esperanto Tulp (EO: Esperanto Tulipo) of, zoals de officiële naam is, Tulipa Esperanto.

De Esperanto tulp is een tulp die vergeleken met andere tulpen erg laat bloeit, d.w.z. halverwege mei. Het is een interessante, kleine en exclusieve tulp. Deze tulp is heel geschikt als geschenk aan Esperanto-vrienden en (nog) niet Esperanto-sprekenden.

De Esperanto Tulp is een korte en bontbladige Viridiflora-tulp. Deze tulpecategorie heeft als kenmerk de groene strepen door het bloemblad. De bloem van de Esperanto Tulp is decoratief, met bonte kleuren wijnrood met groene strepen door het bloemblad. De plant wordt 20 tot 30 cm hoog. De bladeren van de tulp hebben een witte rand. (Bron: Duurzame bloembollen)

Het ontstaan van de Esperanto tulp

Jan Pranger inventis la Esperanto-tulipon. Li loĝis en Breezand, proksime de Den Helder. Li edziĝis al Nel Krispijn, kaj kun ŝi li lernis Esperanton. Nel ankaŭ donis lecionojn pri Esperanto, kaj okazis ke en la geedza hejmo estis 40 kursanoj.

Ekde la 20-aj jaroj de la pasinta jarcento Jan okupas sin pri florbuloj, unue pri tulipoj, poste ankaŭ pri narcisoj kaj krokusoj. En la regiono la kultivado de florbuloj iĝis ĉiam pli grava. En la jaro 1968 J. Pranger kultivis tulipojn, kaj speciale la varion "Hollywood". – La 'Hollywood' estas malalta verda-ruĝa tulipo el la Viridiflora grupo. (Fonto: Jan de Wit en Zonen B.V.) – Tiam li subite inter tiuj tulipoj trovis ekzempleron kiu tute alie aspektis. Jes, fakte li ne kreis ĝin, sed simple ricevis ĝin de la naturo kiel surprizan donacon. Li nomis ĝin "Esperanto".

La floro de la nova tulipo estis ĉine-roza, preskaŭ blanka, kun verda strio sur la petaloj. Ankaŭ la folioj havis blankajn striojn. Tio memorigis pri la koloroj de la stelo kaj standardo de Esperanto, kaj tial li nomis la novan tulipon laŭ la lingvo. En 1968 ĝi estis registrita per tiu nomo.

En la jaro 1977 oni kultivis la tulipon en la eksperimenta ĝardeno de la unuiĝo por florbulba-kultivado en Hillegom. Tiam la tulipo estis premiita



La Esperanto Tulipo

per skriba atesto. En la jaro 1979 ĝi akiris la diplomon de speciala merito. (Bron: Fenikso 2006/3)

Jan Pranger mortis la 9-an de marto 2010.

Bloembollen planten

Tulpenbollen planten doe je in het najaar, tussen september en december, het liefst op een plek waar de tulpen in de volle zon tot lichte schaduw tot bloei kunnen komen.

De tulpenbol houdt er niet van om al geplant te worden als de temperatuur in de grond nog te hoog is. Als de bladeren van de bomen verkleuren en af beginnen te vallen zijn de nachten koud en de temperatuur in de grond gedaald; tijd om tulpenbollen te planten. (Bron: Fluwel)

Graaf individuele gaten of een geul van 15 tot 20 cm diep, plant de bol met de puntige kant naar boven en 12 tot 15 cm uit elkaar. – Omdat het een kleine tulp is, kan het ook 10 cm uit elkaar.

Bedek na het planten de bodem. Nadat je tulpenbollen geplant zijn, bewater je het tulpenbed grondig, totdat de bodem goed vochtig is. Dek de grond af met een 2 cm laag mulch om de bodem te beschermen tegen nachtvorst en om vocht vast te houden.

Geef de tulpen in de herfst en voorafgaand aan de bloei water. Tulpenbedden hebben behoefte aan extra water tijdens lange droge periodes in de winter, wanneer er geen regen of sneeuw valt. (Bron: Bloembollenkopen.nl)

De Esperanto Tulp kopen

Het is nu tijd om tulpen te planten. Het is belangrijk te weten dat als je jaarlijks bij je tuincentrum vraagt naar de Esperanto-tulpenbollen dat deze dan misschien wel in het assortiment worden opgenomen. De prijs is ongeveer € 4 per zakje van 7 of 10 stuks. Het is ook mogelijk de tulpen via Internet te bestellen voor ongeveer dezelfde prijs, maar dan komen er nog verzendkosten bij, tot ongeveer € 9 voor 1 zakje. Zoek niet alleen op Tulipa Esperanto, maar ook op Esperanto tulp. De Esperanto Tulp staat mooi in combinatie met de tulp China Town, een gevlamde roze tulp.

Leveranciers voor verkoop via Internet zijn o.a.:
www.order.verberghe.nl; www.nijssentuin.nl;
www.koopbloembollen.nl en nog vele andere sites waar je ze kunt kopen.



Tulp China Town

Mooie foto's

Heeft u volgend jaar de Esperanto Tulp in de tuin of in een pot, maakt u er dan vooral ook foto's van. We zijn erg benieuwd naar hoe deze tulpen bij u staan.

Pieter Engwirda, Marjet Erasmus, Foppe-Klaas Hovinga

Foto's: Nijssen Tuin Heemstede

Paĝoj el la Flandra Literaturo

Op de site Liberas heeft Peter Laroy een artikel geschreven over het boek Paĝoj el la Flandra Literaturo uit 1904. U kunt het boek lezen door het te downloaden.

In het artikel beschrijft Peter Laroy de geschiedenis van het Esperanto. Over de Vlaamse geschiedenis en het boek Paĝoj el la Flandra Literaturo schrijft hij onder meer:

“Ook in Vlaanderen kent het Esperanto een kleine maar geëngageerde groep aanhangers. Dankzij de inzet van de Brugse uitgever A.-J. Witteryck konden de Vlaamse esperantisten vrij vroeg enkele werkjes op de markt brengen. Onder redactie van Maurice Seynaeve (Ieper) en Raymond Van Melckebeke (Antwerpen) verscheen in 1904 Paĝoj el la Flandra Literaturo, een bloemlezing met werk van Vlaamse literatoren, vertaald naar het Esperanto.” [...] De samenstellers kozen voor werk van Ledeganck, Van Ryswyck, Van Beers, Bergmann, de Mont en de gezusters Loveling

maar ook voor teksten van David, Gezelle, Verriest, Rodenbach en Streuvels. In de ideologisch nog sterk opgedeelde samenleving stonden in dit boek vrijzinnig-liberale auteurs broederlijk naast katholieke auteurs. Het was ongetwijfeld een zeldzaamheid in die dagen, maar onderstreept de universele gedachte die de taal in zich droeg. De keuze voor een bloemlezing was niet zo vreemd. Zamenhof had er eerder voor gekozen om bestaande literatuur naar het Esperanto om te zetten liever dan te vertrekken van grammaticale regeltjes (al bracht Witteryck voor de Vlaamse markt ook wel meer ‘klassieke’ studieboeken uit).

Het boek is te downloaden in diverse formaten (pdf, epub en txt) vanaf de site:

<http://www.gutenberg.org/ebooks/48033>

Bron: <https://www.liberas.eu/esperanto-wereldtaal/>



Nieuwsgroep < espned > is verhuisd

Groups.io is een e-mailgroep service op Internet, om nieuwsberichten met elkaar te delen. Je meldt je aan op een nieuwsgroep en vervolgens kun je nieuwtjes toesturen en nieuwsberichten ontvangen. Je bepaalt zelf wanneer je de nieuwsberichten wilt ontvangen. De nieuwsgroep <espned> is een persoonlijk initiatief van Ronaldo NOBEL. Hoe meer mensen mee doen, hoe interessanter het wordt.

Van Ronaldo NOBEL

De nieuwsgroep **<espned>** is een emaillijst die ik heb opgezet voor Vlaamse, Nederlandse en andere Nederlandstalige esperantisten. Het is bedoeld voor per- en por-esp-a dingetjes en voor vertaalkwesties. Tot vorig jaar liep ie - met honderden andere esperanto-groepjes - bij yahoogroups, maar helaas heeft VERIZON besloten de meeste kenmerken van yahoogroups eraf te slopen - inclusief het berichtenarchief en de mogelijkheid om bundeltjes of geen mailtjes te ontvangen.

Vandaar dat we verhuisd zijn naar groups.io, een privé-project van ene Mark Fletcher, pionier van dat wat later egroups en nog later yahoogroups zou gaan heten.

Wat is er anders dan yahoogroups?

- Antwoorden doe je in principe online.
- Je kunt berichten "liken".
- Ook niet-leden kunnen berichten sturen naar **espned@groups.io** en, als de beheerder (ondergetekende of Miko) het bericht toelaat, de antwoorden per email ontvangen.
- Het aanmeld-adres **espned+subscribe@groups.io** bevat een plus

i.p.v. een min. Dit geldt ook voor de nomail, digest en normal-receptjes.

- Bundeltjes ("digest") zijn persoonlijk. Als er minder dan 12 berichten zijn, ontvang je ze om 6 uur 's morgens.
- Als je je commentaar boven het citaat zet (top-posting, TOFU) wordt in digests automatisch dat citaat verwijderd.
- Als jou een draad/discussie niet interesseert kun je die middels de "mute this topic"- link afbestellen.
- Als je het archief leest, kun je ervoor kiezen bepaalde draadjes juist *wel* in je e-mail te krijgen.
- Je kiest er zelf voor of andere abonnees jouw e-mail zien staan in de directory of niet. En uiteraard is er geen reclame en houdt groups.io niet bij wat je verder op Internet doet. Het wordt gefinancierd via premium-groepen.

Tot nog toe heeft <espned> maar een paar berichten per maand.

Zie <https://groups.io/g/espned/>

In Esperanto-land zijn veel wetenschappers. Twaalf jonge Esperantisten vertellen over hun vakgebied (astrofysika, moleculaire medicijn, robotica en veel andere onderwerpen).

Esperantujo estas plena je sciencemuloj! 12 junaj esperantistoj rakontas pri siaj fakoj (astrofiziko, molekula medicino, robotiko, kaj pluraj aliaj).

Ga naar / vidu :

<https://www.youtube.com/watch?v=PIbMPEvaUFQ>

ESPERANTO KAJ SCIENCO

Vortserĉenigmo

La temo de la enigmo de ĉi tiu eldono estas **En la kosmo**.

Solve ĉi tiun enigmon per forstrekado de ĉiuj vortoj el la listo sube. La restontaj literoj kune formos frazon.

Kreita de Frank van Hertrooij

S S P U T N I K O N I R J I A
F A O K O M E T O G A R U D N
E O T T P L A N E D O A P O I
O K R E I S L R A S S T I O F
I E S A L V V M S T N Ŝ T R N
S K L T N I A E E O I V E B E
K O U I E L T R N T F E R I S
A R G I V R O O G U O B O T J
L R O A P I T R N Ŝ S I Ĝ O I
A F R N D E A E I A S O L A K
G M L O D K R M R R I N G O J
A H O U E I P S O A O L O L O
J E D T G O R R O P N N L E M
O L O R N I E I L U N O U T U
A A S A S T R O N O M I O S L

Asteroido
Astronomio
Eksterterano
Flugi
Fora
Galaksio
Gravito
Hela

Impona
Jupitero
Kometo
Kuipers
Lumo
Luno
Malvarma
Marso

Nifo
Nigra
Orbito
Paraŝuto
Planedo
Raketo
Ringo
Rondiri

Satelito
Senfina
Sputniko
Stelo
Suno
Ŝvebi
Tero
Venuso


Solve de la lasta vortserĉenigmo:
"Ili kreskos se vi havas paciencon"

Prezentado pri Esperanto en Zutphen

De Pieter Engwirda.

La 12-an de septembro Pieter Engwirda el Zutphen prezentis Esperanton al la societo "Derde Fase (tria fazo)" en sia urbo.

La societo "Derde Fase (tria fazo)" en Zutphen estas reto de homoj kiuj subtenas unu la alian dum la maljuniĝo. Ĉar mi estas membro de tiu ĉi societo de tempo al tempo mi parolas pri Esperanto kaj mencias ke mi estas Esperantisto. Do, oni petis min ĉe la programero "Malferma Podio" de tiu ĉi societo fari prezentadon pri Esperanto. Mi faris tiun kun la titolo "Esperanto: ĉu ĝi ankoraŭ ekzistas?". Dum tiu ĉi prezentado je sabato la 12-an de septembro ĉeestis 12 (maljunaj) personoj kiuj certe jam aŭdis pri Esperanto, opinias ke ĝi ne plu ekzistas kaj neniu vere konas ĝin.



Ĉar mi ne povis uzi projekciilon mi faris helpilojn sur "flipchart-paĝoj". Vidu ĉi-kune.

Mi komencis mian prezentadon dirante ke la respondo al la demando ĉu Esperanto ankoraŭ ekzistas estas jes, kun la pruvo ke mi estas esperantisto.

Mi kunportis diversajn broŝurojn kaj (lerno)librojn plus ekzemplerojn de diversaj revuoj. Mi donis al ĉiuj ĉeestantoj ekzempleron de la broŝuro

"Esperanto zwart op wit". Estis multaj bonaj demandoj, ankaŭ pri kiel lerni la lingvon. La respondo estis: ĉeestu studsemajnfino.

Mia prezentado konsistis el 3 partoj:


1. Kiel mi ekkonis Esperanton?
2. La lingvo.
3. La movado

1. Kiel mi ekkonis Esperanton?

Mi klarigis ke proksimume antaŭ 20 jaroj mi loĝis en Voorburgo, apud Hago, kaj mi interesiĝis pri ĝemelaj urboj, ĉar ĝi estas movado kiu originas de sube, el la popolo, anstataŭ el la registraro. Voorburgo havis tri ĝemelajn urbojn i.a. Hranice en Ĉeĥio. Ene de la komitato en Voorburgo pri la ĝemeliĝo kun Hranice estis homoj kiuj okupis sin pri diversaj temoj, i.a. geedzoj (Marjet kaj Hans Erasmus) pri Esperanto. Mi ne tre atentis pri la Esperanto-geedzoj, mi nur notis la ligan ke per la radio en tiu epoko foje estis elsendoj pri Esperanto. En la jaro 2001 la esperanto-geedzoj anoncis ke, okaze de la dekjariĝo de la ĝemeliĝo, la du Esperanto-klubo en ambaŭ urboj organizos senpagan kurson pri Esperanto. En tiu tempo mi ne plu laboris kaj mi interesiĝis pri lingvoj. Do mi decidis aliĝi al la kurso. Post kelka tempo, iam en la jaro 2002, la gvidanto de la kurso, Hans Erasmus, atentigis min ke en la venonta jaro estos Universala Kongreso de Esperanto en Gotenburgo, Svedio, kaj sugestis ke mi povos aliĝi. Mi pensis ke jes mi povas iri al multaj lokoj; tamen mi decidis aliĝi al la kongreso.

Ĉeesti la kongreson estis por mi

grandega kaj tre agrabla surprizo: estis 1800 homoj el 62 landoj kiuj parolas unu lingvon kaj aktivas por paco! Tuj mi decidis aliĝi al UEA kaj al la landa asocio Esperanto Nederland. En la postaj jaroj mi ĉeestis diversajn Universalajn Kongresojn: en Lahtio (Finnlando), Lisbono (Portugalio), Seulo (Koreio), Nitro (Slovakio), Lillo (Francio), Bonaero (Argentino), Rejkjaviko (Islando), ...kaj tutmonde vojaĝis per Esperanto!



2. La lingvo.

Mi kopiis la paĝon numero 12 el la Esperanto vortaro de Petro de Smedt al la formato A1 kiu estas la formato de flipchartpaĝoj. Tiu kosta nur kelkajn eŭrojn ĉe la kopia vendejo.

3. La movado

Mi rakontis pri Lejzer Zamenhof, la Universalaj Kongresoj kaj la apoj kiujn ni nun havas.

PS Ineke Emmelkamp atentigis min pri la paĝo en la retejo de Esperanto Nederland pri informmaterialoj: <https://www.esperanto-nederland.nl/ned/informatie/informatie.php>.



Deziroj por 2021

Kion vi deziras por 2021, kaj al kiu; al via familio, al viaj amikoj, al la membroj de Esperanto Nederland, al vi mem? Sendu al ni viajn dezirojn por 2021 kaj ni metos ilin en la venontan numeron de Fenikso.

Universala Kongreso 2021

Nederlandanoj pagas ĝis la 31a de decembro:

- | | |
|--|-----------|
| 1. individua membro de UEA (ne inkluzivas aligitajn membrojn) | 190 Eŭroj |
| 2. ne individua membro de UEA | 240 Eŭroj |
| 3. komitatano / kunulo / junulo / handikapulo, mem individua membro de UEA | 95 Eŭroj |
| 4. kunulo / junulo / handikapulo, ne individua membro de UEA | 145 Eŭroj |

Por pli da informoj kaj por aliĝi vidu: <https://uea.org/kongresoj>



La dua premio por Kajto

Esperanto Nederland gratulas Nanne Kalma kaj Ankie van der Meer pro ilia dua premio dum la 8-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj.

En la aĝkategorio 0-18 la ensemblo Kajto gajnis la duan lokon kun la kanto **La tuboj**.

Vortoj de la kanto La tuboj estas de Ŝtefo Urban kaj la muziko estas de Nanne Kalma.

Ĉi-jare estis tri kategorioj: koruso aŭ ensemblo, solisto, registrita en studio. La aĝkategorioj estis la samaj: 0-18 jaroj / 19-54 jaroj kaj 55-111 jaroj. Sufiĉis kanti nur unu kanton en Esperanto. La unua premio en la aĝkategorio 0-18 gajnis Oliwia Maciejewska el Pollando kun la kanto Hello (de Adele).

<https://youtu.be/HMDg-vUV1oQ>

Fonto: Festivala Kuriero de 18-a de septembro 2020, numero 18

Kant-video kaj Manifesto

Ĉiujare la Internacia Tago de Paco estas celebrata tra la mondo la 21an de septembro. La Ĝenerala Asembleo de UN deklaris ĉi tiun tagon tago dediĉita al fortigo de la idealoj de paco, per 24 hora promeso al senperforto kaj batalhalto. Kajto registris kant-videon kaj alvokas al homojn kolekti multajn tradukojn de unu frazo.

1. Kant-video

Maandag 21 september 2020 was er wereldwijd de dag van de Vrede. Wij waren uitgenodigd om mee te doen aan een filmfestival voor de vrede van de UNESCO. Dat festival is afgelast maar wij hebben zelf een video-clip gemaakt van ons vredeslied in het Esperanto 'Sen Timo' (Zonder Angst), met vele muzikanten uit binnen- en buitenland.

Die clip hebben we op YouTube gezet. Graag brengen wij dit lied onder je aandacht.

'Sen Timo', la kant-video de Kajto: <https://www.youtube.com/watch?v=oleyMmMYyOM>

2. Manifest 'Sen Timo'

Behalve de clip en het lied zijn we ook begonnen met een Manifest 'Sen Timo'.

Voor dit manifest verzamelen we in zo veel mogelijk talen de vertaling van de zin:

*In vrede te spelen -
zonder angst te hollen en dollen,
te dansen, springen en zingen
... is een recht van ieder kind!!!*

'Sen Timo', la Manifesto Iru al: www.nanne-ankie.nl

Kajto

Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko 2020

PMEG – la verko pri la Esperanto-gramatiko


La Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko (PMEG) de Bertilo Wennergren estas verko por ordinaraĵ esperantistoj, kiuj volas detale studi la gramatikon, vortfaradon, skribon kaj elparolon de la Internacia Lingvo.

PMEG estas unuavice praktika lernilo, ne teoria verko por lingvistoj. Ĝi provas klarigi la lingvon en facila maniero – kaj la plej bazajn aferojn, kaj tre specialajn detalojn. Ĝi uzas por helpi al la klarigoj abundon da ekzemploj, inter kiuj estas multege da ekzemploj el la Fundamento kaj la verkaro de Zamenhof.

PMEG traktas kaj modernan kaj klasikan lingvouzojn. Esence PMEG estas konservema verko, kiu multloke defendas la Fundamentan kaj Zamenhofan lingvaĵon kontraŭ diversaj reformemaj ideoj kaj uzoj, sed ĝi ankaŭ prezentas modernajn uzojn kaj evoluojn, eĉ tiajn, kiujn iuj eble opinias tro drastaj.

Pri la nova eldono de PMEG – sub la nomo PMEG 2020 la aŭtoro diras: „Ĝi estas profunde tralaborita eldono. En preskaŭ ĉiu sekcio mi faris korektojn aŭ kompletigojn, aŭ prilaboris la prezenton por ke ĝi estu pli klara.”

Por legi pli kaj mendi, vidu: <https://pmeg.ikso.net>.



Vi ankaŭ povas elŝuti ĝin en HTML- kaj pdf-formato.

N.B. La organizantoj de la studsemajnfinoj legis la anoncon pri tiu libro. Ĉu ne estus interesa libro por niaj instruistoj? Ĉu ni foje regalumu ilin? La kasisto subtenis la ideon. Ni mendis 15 librojn por disdoni al niaj fidelaj kunlaborantoj! Kaj ni esprimas nian deziron ke venontjare ni denove vojaĝos al Krikkenhaar por studi. *Arjen-Sjoerd, Ineke kaj Lilian.*

Persa kurso

Said Baluĉi (estranano de Esperanto Nederland) tradukis la libron "Esperanto per rekta metodo" de Stano Marĉek en la persan lingvon.

Stano Marĉek estas slovaka Esperantisto kiu eldonas librojn por lerni Esperanton. Li verkis la libron: "Esperanto per rekta metodo". Tiu libro nun estas havebla en tre multaj diversaj lingvoj. Estas bona, modernstila libro.

La libro estas mendebla ĉe la libroservo de UEA. Haveblas en du formoj.

- Papere por € 7,50 ĉe: <https://katalogo.uea.org/?inf=9810>
- Elektronike en PDF-formato kune kun la voĉlegitaj tekstoj en mp3-formato por € 15,00 ĉe: <https://katalogo.uea.org/?inf=9811>



Rezultoj jarfinaj en IZO

En la lasta numero de Fenikso ni metis artikolon 'School in Togo' en kiu Ans Bakker-ten Hagen kaj Dzifa Gbeglo skribis pri la lernejo kaj en kiu ili alvokis doni monon. Jen dankletero pro ĉiuj donacoj kaj skribaĵoj pri kiel fartas la infanoj dum la lernojaro 2019-2020.

Estimataj legantoj,

Pluraj el vi estas fidelaj subtenantoj de Instituto Zamenhof (IZo) en Togolando. La lernejo kiun iniciatis Koffi GBEGLO kaj kiu stariĝis dank'al la persistemaj klopodoj de Hans Bakker. Li sukcesis trovi la financojn. Ĉe esperantistoj sed ankaŭ - kaj grandparte - ĉe fondaĵoj kaj entreprenoj kiuj neniel rilatas al Esperanto. Tio estas historio. La aktuala situacio estas ke restas multaj personoj kiuj regule donacas por ke la jara studkotizo estu kiom eble plej malalta. Tion oni faras per St. Een School in Togo ĉe TRIODOS Foundation. Iam mia edzo sendis regule novaĵojn al la donacantoj. Mi ne povis daŭrigi tion. Plejparte la (ret)adreso estas nekonataj kaj la banko ne povas/ne rajtas informi.

La rekono pri tiu malavaro kaj mia danko restas. De GBEGLO mi ricevis la ekzamenrezultojn 2019/2020. Vi certe interesiĝas. Se vi konas subtenanton kiu ne estas membro de Esperanto Nederland, bonvolu informi ŝin/lin. Anticipe mi dankas pro tiu kunlaboro. Same dankon al la redaktoroj kiuj helpas konatigi la rezultojn de IZO dum mi ne plu povas atingi ĉiujn kontribuantojn.

Ans Bakker-ten Hagen

Rezultoj tutaj de la fino de la lernojaro 2019-2020 en Instituto Zamenhof en Togolando

La 16-an de septembro 2019 komenciĝis la lernojaro 2019-2020 en Togolando. Tiam aperis la tutjara programo kiu montris, ke la fino de la lernojaro estos en julio 2020. La 20an de marto 2020 la registaro fermigis ĉiujn lernejojn pro la pandemio de korona viruso. Vere la lernojaro estas perturbita. Fine de majo 2020 la registaro decidis iel savi la lernojaron. Tiam ĝi decidis ke kandidatoj al diversaj ekzamenoj ŝtataj reiru al la lernejoj la 15-an de junio, ke post sessemajna kurso, ekokazu la ekzamenoj. Tiam aperis ankaŭ la dato de la eko de la lernojaro 2020-2021 : la 26-a de oktobro 2020. Nenio preciza pri la fino de la lernojaro 2019-2020 aperis. Verŝajne la proklamo de la rezultoj de ĉiuj ekzamenoj ŝtataj finos



la lernojaron 2019-2020. Ne forgesindas la aliaj klasoj, kiuj ne trapasis ŝtatajn ekzamenojn; la registaro decidis, ke, por taksado de tiuj gelernantoj, oni uzu la rezultatojn de la ekzamenoj de la fino de la trimestroj unua kaj dua. La 23-an de septembro 2020 ĉiuj rezultatoj de la elementa kaj meza niveloj estas konataj kaj la 25-an finiĝis, en Instituto Zamenhof (IZo), la lernojaro 2019-2020. Jen aperas sube ĉiuj rezultatoj de la lernojaro 2019-2020.

1. Infanvartejo

Estas du sekcioj. La unua koncernas la infanojn 3-4-jarajn dum la dua, la infanojn 5-jarajn. Ĉiuj 15 gelernantoj de la unua sekcio sukcesis, same por ĉiuj 24 gelernantoj de la dua sekcio. Do, estas 100 % da sukceso en ĉiu sekcio.

2. Elementa nivelo

- Ĉiuj 36 gelernantoj de la klaso sukcesis : 100 % da sukceso
- En la dua klaso kun 40 gelernantoj, sukcesis 37 : 92,5 %
- Estis 40 gelernantoj en la tria klaso. Du el ili forlasis la kvartalon, do ankaŭ la lernejon IZO. Ĉiuj 38 restantaj gelernantoj sukcesis : 100 %
- El la 40 gelernantoj de la kvara klaso, sukcesis 37, tio estas 92,50%.
- En la kvina klaso estis 41 gelernantoj. Unu devis forlasi la kvartalon. El la 40 restantaj, sukcesis 38, kio estas 95 % . >

- La gelernantoj de la sesa klaso trapasis la ŝtatan ekzamenon CEPD pri finstudo en la elementa nivelo. 37 gelernantoj el 38 sukcesis, kio estas 97,36 %.

3. Meza nivelo (Kolegio)

- La unua klaso havas 68 gelernantojn, sed unu forlasis la kvartalon. El la 67 restantaj, sukcesis 63, kio estas 94,02 %.
- En la dua klaso estis 56 gelernantoj, sed du forlasis la kvartalon de IZo. 50 el la 54 restantaj sukcesis, kio estas 92,59 %.

- En la tria klaso kun 64 gelernantoj, sukcesis 55, kio estas 85,93 %.
- La gelernantoj de la kvara klaso trapasis ŝtatan ekzamenon. El la 58 gelernantoj de la klaso, sukcesis 54, kio estas 93,10 %.

Finiĝis la lernoĵaro 2019-2020 kaj tuj montriĝas, ke necesas plano por la venonta, kiu ekos la 26-an de oktobro 2020. Kvankam la kronviruso pluestas, la registaro certigas, ke ne estos prokrasto. IZo sekvas la rekomendojn de la registaro, kaj vere pretiĝas por la nova lernoĵaro.

Pri lingvoj

Gebruik je moerstaal en Esperanto

De Bert de Wit

Jen parto el Haarlems Dagblad (verŝajne ankaŭ Noord-Hollandse Courant) de la 19-a de septembro 2020. Mi ensendis leteron post letero en la opinipaĝo pri la angligo de la nederlanda lingvo kiu aperis en la ĵurnalo de la 12-a de septembro. Oni mallongigis mian leteron, sed la kerno restis pli malpli. La tutan leteron vi ankaŭ trovos ĉi kune.

Het pleidooi van dhr. Hoogendonk voor het gebruik van onze moerstaal in plaats van allerlei Engelse woorden kan ik van harte ondersteunen. Het is echter de vraag waarom en door wie die Engelse termen gebruikt worden.

Daar gaat hij niet op in. Om die vraag te beantwoorden kun je kijken naar de psychologie en naar de sociologie. Het strooien met woorden uit vreemde talen wekt de indruk dat je geleerd bent en dat je graag wilt laten blijken dat je vreemde talen kent. Je "hoort erbij" als je dat Engels gebruikt.

Daarnaast is het een kwestie van economische en politieke macht van de VS. Aan het eind van de negentiende eeuw (de tijd van Couperus) was het gangbaar om met Franse woorden te laten zien dat je een goede opvoeding had gehad en Frankrijk had politiek veel invloed in Europa. Sinds de Tweede Wereldoorlog is de VS wereldmacht en dat werkt ook door in de economie, de politiek en de cultuur. Het is als met de oude koloniale machten, die hun talen opdrongen aan andere volkeren. Hier gaat dat sluipenderwijs. Op school wordt vaak maar één vreemde taal geleerd, het Engels. Vroeger was viertaligheid gebruikelijk in kringen in Nederland die de middelbare school hadden bezocht. Dat is voorbij.

Deze verschraving van de taalkennis leidt tot een culturele vernauwing van jewelste. Op de Nederlandse TV zie je vrijwel niets anders dan Engelstalige series. Diegenen, die de programma's samenstellen hebben totaal geen benul van wat voor goede programma's er in Duitsland of Frankrijk gemaakt worden. Ze begrijpen de taal gewoon niet en wat je niet begrijpt, dat is niet de moeite waard...

De vraag is wat je hiertegen moet doen. M.i. twee dingen. Ten eerste geen producten kopen van firma's die zo graag met een Engelse tekst werken om hun product aan te prijzen. En sprekers die graag met Engelse woorden strooien vragen wat ze bedoelen. Soms kunnen ze het niets eens uitleggen in gewoon Nederlands.

Ten derde: actief stimuleren dat op scholen meer aandacht komt voor de wereld buiten de Engelstalige landen. Belachelijk dat kinderen in grensgebieden geen Duits of Frans kunnen leren. Ikzelf gebruik al vele jaren de neutrale internationale taal Esperanto om met mensen in andere landen te praten en om deel te nemen aan een echt internationale cultuur. Begin augustus heb ik bijvoorbeeld een Esperanto-congres bijgewoond via internet met 1850 deelnemers uit meer dan 90 landen. Daar spreek je elkaar op gelijke voet. Een neutrale internationale taal is m.i. een vereiste voor democratische internationale betrekkingen.

Roterdamo 2020

Dum la pandemio la verkisto iris en sian kelon kaj trovis lukon neniam viditan antaŭe. Li falis al la jaro 4020 kaj renkontas Fobo-n: malgrandan, senharan, estulon. La verkisto ekscias, ke multaj aferoj ŝanĝiĝis.

Mi: Ne. Evoluo ne estas individua fenomeno. Ĝi estas kolektiva kaj okazas en regiono aŭ filumo aŭ klaso da faŭno aŭ flaŭro...

Fobo: Ha ha ha mia Darvineto. Vi, homoj, plenas de oksimoroj, kontraŭdiroj, paradoksoj. Vi diras ke la jaro 1520 plenis de kruelaĵoj, sed la samajn kruelaĵojn en la jaro 2020 vi absolute neglektas.

Mi: Verŝajne vi pravas, sed mi timas...

Fobo: Ŝanĝiĝo ĉiam timigas homon. Sed resti en la timo signifas resti en la malprogreso kaj regreso.

Mi: Ĉu vi intencas ŝanĝi min?

Fobo: Ne per forto kaj devigo. Via cerbo ankoraŭ ne estas preta ke mi enŝutu en ĝin necesajn novajn sciojn. Vi bezonas tempon. Vi, homoj, al kutimiĝis pasigi tempon per nenecesaj faroj. Pro tio viaj oficistoj eĉ ricevis salajron, ha ha! Tial via evoluo daŭris jarcentojn. Se mi perforte enŝutos en vian cerbon novajn sciojn, altprobable ĝi rifuzos aŭ misuzos la forton kaj mi perdos kaj mian tempon kaj mian ĉasaĵon. Ankoraŭ restas aferoj de la homa cerbo kiujn mi devas pristudi. Ĉefe vin mi persone ŝatas savi kaj kiel eble plej baldaŭ Suhomigi. Ni ja iomete estas homoj kaj iomete da personaj sentoj eblas, ha ha! Mi havas impreson ke iom da viaj genoj estas en mi, sed mi ne volas pruvi tion. Se vi fariĝos Suhomo, eble iam vi ricevos permeson reveni al Roterdamo 2020.

Mi rimarkis ke ri volas pli intimiĝi kun mi, eble ri bezonis min pli ol mi antaŭe supozis. Eble mi estis tre grava por ri aŭ ria organizo. Mi volis pli sondi. Tial mi demandis:

- Sed ĉu Suhomoj, kiel ni homoj, havas timon, esperon, sopiron?...deziron, volupton, bezonon...

Fobo: Ho, stop! stop! Ĉu vi kredas ke la respondojn al tiom da demandoj vi povos digesti en unu fojo? Estas tro por vi, kara Sono.

Mi: Bone, mi demandas unu post la alia. Kial vi havas tiun strangan nomkodon?

Fobo: Tutlogike, por ne konfuziĝi. Imagu en via lando/tempo ekzistis la sama nomo por 25,847% de la loĝantoj. Ĉu tio laŭ via nuna logiko ne estas stultaĵo? Tial ni elektis unikan nomkodon por ĉiu

Suhomo. Kvankam ni intense similas unu al la alia, tamen en detaloj ni malsamas. Ĉiu el ni estas unika. Ĉiu el ni havas siajn proprajn karakterizaĵojn, apartajn kapablojn, apartajn fort- kaj malfortpunktojn ktp. Nia evoluo ankoraŭ daŭras. Suhomo ankoraŭ ne estas perfekta.

Mi: Ĉu vi estas "li" aŭ "ŝi"?

Fobo: Mi vidas en via menso ke vi intencas nomi min Ri se vi rakontus tiun ĉi nian renkonton al iuj aliaj. Mi permesas al vi rakonti vian nunan travivaĵon. Ĝi utilos kaj por Suhomoj, kiujn vi baldaŭ renkontos, kaj por homoj de via tempo, kien vi eble vojaĝos. Via elekto de Ri estas saĝa. Nun revene al via demando: mi estas nek li nek ŝi, sed ambaŭ. Ni forprenis la seksmalsamecon inter Suhomoj. Mi estas mi. Mi ne bezonas alian Suhomon por ami aŭ amori, eĉ ne por formi familion aŭ naski bebon. Ĉu Suhomo samtempe estas kaj li kaj ŝi. Ĉu vi forgesis "Zurvan"-on, vian unuan Dion, kiu estis kaj "Li" kaj "Ŝi", kiu gravedigis sin mem kaj naskis Ahura-Mazdaon kaj Arimanon? Mi amas min kaj mi amoras kun mi mem. Mi povas fekundigi min mem se estus bezonate. Partnero, tempo, loko ktp. estas tute signifikaj por amori. Vidu...

Kaj ri montris siajn du seksorganojn. Estis malsimilaj al tiuj de la homoj sed esence mi povis kompreni iliajn funkciojn. Mi havis impreson ke ili kapablis fari ankaŭ aliajn taskojn, sed momente mi hontis plu demandi.

Ri tuj legis mian menson:

- Ŝajnas ke vi hontas plu paroli pri ĉi afero. Jes, mi legas vian menson. Ne hontu. Honto ne estas natura fenomeno, ĝi venas el moralo kaj moralon inventis superaj homoj por teni la sklavojn en la sklaveco. Ĉu ne estas tiel? Pensu! Mi bezonas vian penson.

Mi: Sed ĉu surstrate vi aperas tiele?

Fobo: Ni ne havas stratojn, ni ne plu bezonas...

Mi: Aŭ inter via familio?

Fobo: Ni ne havas familion, ni ne plu bezonas...

*Venontfoje la daŭrigo de la rakonto.
Rakonto verkita de Saïd Mozaffari*

Medito sur la meditoserio pri Zamenhof #zamenmed

Pri avantaĝoj kaj limoj podkastumi en Esperanto hodiaŭ

Federico Gobbo



Kunmeto de la aŭtoro, por la retpaĝo patreon.com/zamenmed

Dum la kvaranteno mi komencis elsendi videoserion pri mia nekutima vivo en Amsterdamo dum la ekestiĝo de la Kovima Epoko. Jes ja, ni devas ŝanĝi nian kalendaron; ne plu antaŭ aŭ post Kristo, sed antaŭ aŭ post Kovimo: ĉi tiu viruso sukcesis bremsi eĉ la plej fortajn religiojn de la Tero, ĉar unuflanke la Papo diservis tute sola en Vatikano, aliflanke la Islama pilgrimado al Mekko tial ne okazis. Por doni nur du frapajn ekzemplojn.

Mi troviĝis fizike pro miaj instruaj devoj en Amsterdamo kiam alvenis la Kovima Epoko, en ĉi jaro 2020, t.e. Jaro Nulo post K., ĵus antaŭ la ekestiĝo de printempo. Tiam, mi estis instruanta Esperanton en la Universitato de Amsterdamo. Mi devis abrupte ŝanĝi la tutan kurson el enklasa formato al plene retuma, kaj pro la ŝanĝo kelkaj el miaj studentoj sentis sin solaj kaj instigis min vidblogi ion por ili ĉiutage por resti en kontakto. Kaj jen kial mi kreis la videoserion #kronvirustempevivi, spektebla per Jutubo (bit.ly/kronvirustempevivi).

La graveco de la videoserio iris preter mia Esperanto-klaso. Ne estis nur bezono de la studentoj, sed ankaŭ de mi. La videoserio finfine iĝis spaco por eksperimenti, esplori, testi. Unu el la plej interesaj atingoj estis mia esperantigo de originala itala kanto de Anna Luppi (<https://youtu.be/GUVFI4e7duQ>), kaj jam printempas, kies originala versio en la itala poste gajnis nacian premion en la Festivalo por la Aŭtorkanto 2020 en Ĝenovo (<https://twitter.com/i/events/1289221835138011136>).

Rande de la fino de la videoserio (64 epizodoj entute), mi komencis laŭtlegi eltirojn el la Originala Verkaro aŭtore de Zamenhof por mediti kun la publiko sur ili. Temas pri **senpretendaj, leĝeraj meditoj, preskaŭ komentoj, ne el profesora katedro. Mi decidis engaĝi dum unu tuta jaro, alivorte produkti 366 meditojn.**

Mi celis, ke ĉiu medito daŭru malpli ol 10 minutojn por esti sufiĉe eltenebla — esence mi rigardas la aptelefonon kaj parolas, sen iu ajn speciala, do la daŭro estu sufiĉe mallonga. **Mi nomis la meditoserion Zamenhofaj Meditoj, kradvorto #zamenmed** (patreon.com/zamenmed).

En la sekva numero la daŭrigo de ĉi tiu artikolo.

Tiu ĉi artikolo aperis unue en Medium: <https://medium.com/@federicogobbo/medito-sur-la-meditoserio-pri-zamenhof-zamenmed-a901545a8c5b>

Lerni Esperanton donas al ni avantaĝojn

Kees Ruig sendis al ni kolumnon de 25-a de julio el *Het Parool*, kun la titolo “Do not let the cheese eat off your bread”. En tiu kolumno **Marcel Levi** (Nederlandano de la jaro 2016 kaj ĉefoficisto de **University College London Hospitals**) laŭdas la multlingvecon.

En sia kolumno Levi skribas ke Nederlando apartenas al la antaŭaj kuristoj en Eŭropo, kun 95 elcentoj de homoj kiuj kapablas uzi duan lingvon. Pli ol tri kvaronoj de la Nederlandanoj eĉ parolas tri lingvojn. Tio estus grava faktoro kial nederlandanoj estas en neproporcia parto en la direkto de internaciaj kompanioj. Ĝi iomete utilas en la eksterlanda komerco.


Laŭ Levi dulingvaj homoj havas pli bonan memoron, pli ofte povas fari pli ol unu taskon samtempe kaj pli rapide komprenas kompleksajn situaciojn. Tiu dulingveco ankaŭ plibonigas la cerbajn ĉelojn kaj estas la kaŭzo kial demenco komenĉiĝas kvin jarojn pli malfrue ol ĉe homoj kiuj parolas nur sian denaskan

Sur la artikolo *Kees Ruig* gluis:

1. *Lernu Esperanton*
2. *Pro Esperanto vivu pli sana.*

lingvon. Kiu suferas pro Multobla Sklerozo perdas malpli rapide gravajn cerbofunkciojn se dulingva.

Kion diras tiu kolumnisto al ni? Interese estus eltrovi, kiom la lernado de Esperanto helpas nin en komercado. Verŝajne (ankoraŭ) ne estas multe da kompanioj en kiuj vi povas uzi Esperanton. Sed ke lernado de Esperanto estas bona por nia sano, tio estas tre bela.



Nous, les Européens

In de serie “Nous, les Européens”, van de Franse zender TV Monde 5, gaat journalist Francis Letellier op zoek naar oplossingen die verschillende landen bedacht hebben voor de problemen waar de 500 miljoen Europeanen mee te maken krijgen.

Op 18 september ging het ook over Esperanto als neutrale internationale taal. Ze lieten even Lu Wunsch Rolshoven zien in Berlijn die een paar woordjes Esperanto sprak. Een positief verhaaltje van een minuut of 5.

Aangedragen door Bert de Wit

Oferto el malnova librokesto

La unua skatolo nun estas malplena. Sed alvenis nova stoko, ĝi estas heredaĵo de Esperantisto el Groningen. Mi elektis kelkajn librojn pri kiuj vi eble interesiĝas.

1. Ĉu vi emas kanti? En la skatolo estas kantlibro **'Internacia Kantaro'** muzika eldono el Leipzig (1930). Kolekto de 130 kantoj el 53 landoj, kun tekstoj kaj muziknotoj. Do: ekkantu!
2. **'Hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ'** verkita de Bernard Golden, 95 paĝoj.
3. **'Vijf kunsttalen'**, verkita de dr. W.J.A.Manders, 1947
Vergelijkend onderzoek naar de waarde van het Volapük, Esperanto, Ido, Occidental en Novial. In het Nederlands geschreven.
4. **Tra sovaĝa Kamĉatko** de Sten Bergman (1932). En ĝi estas pluraj fotoj. Ĉu vi scias kie situas Kamĉatko? La posedinto tradukis malfacilajn vortojn kaj notis krajone la tradukon en la nederlanda lingvo.
5. **Sonĝo kaj maldormo sub la karpneto**, (1972) de Ivo Andriĉ. Tradukita de Roger Imbert kaj Zlatko Tislar. La vivo de Bosnia vilaĝo estas priskribita.
6. **Unua legolibro**, (1922) de dr.o Kabe. Gradigitaj Legaĵoj kun Frazlibro kaj modeloj de Leteroj. Ĉu vi konas la verbon 'kabei'?
7. **Aktualaj problemoj de la nuntempa internacia vivo**, (1952) de Ivo Lapenna. Temas pri fundamentaj nocioj. Lukto por la paco per juraj rimedoj. Internaciaj organizaĵoj.
8. Kaj por diligentaj lernantoj: **La konsilanto, pri la esperanta gramatiko** de G.J.Degenkamp. Tweede, geheel herziene druk. Nederlandlingva.

Vi povas elekti tiom da libroj kiom vi deziras. Vi pagas la sendokostojn. Se mi ricevas pli ol unu peton por la sama libro, mi elektas al kiu mi sendas ĝin. Ne eblas fari proteston kontraŭ tio! 😊

Salutojn, Ineke Emmelkamp, sekretario@esperanto-nederland.nl




En la pluvo

(Onder moeders paraplu.)

*Sub de l' patrino pluvombrel'
marŝis du infanoj,
Hanneke kaj Janneke, intimaj amikinoj.
Kaj la ŝuoj faris klik-klak-klak,
kaj la pluvo faris tik-tak-tik
sur de l' patrin' ombrel'
sur d' l' patrin' ombrel'.
sur d' l' patrin' ombrel'.*

Oproep voor bijdragen

Elk lid van Esperanto Nederland houdt zich op zijn of haar eigen manier bezig met Esperanto, of het is met het bestuderen van de grammatica, het schrijven van gedichten of andere teksten, het ontmoeten van andere Esperantisten, fysiek of op sociale media. We roepen u op om uw ervaringen met ons te delen. Uw verhalen zijn meer dan welkom, zowel in het Esperanto als in het Nederlands. Stuur u ook foto's mee. Grammaticale fouten corrigeren we. Inkorten en andere aanpassingen doen we alleen in goed overleg met u. Wanneer u wilt, kunnen we ook een interview houden. Neemt u bij langere teksten eerst contact met ons op. Stuur uw bijdrage op naar: redakcio@esperanto-nederland.nl.





5 - 7 maart 2021 Esperanto Studieweekend

Voor wie Als je nog nooit Esperanto hebt geleerd, of jouw Esperanto is nog niet zo goed als je zou willen, ben je van harte welkom. Er wordt op verschillende niveaus les gegeven. De nadruk ligt op het oefenen van het spreken in Esperanto in kleine groepen


Wanneer Het studieweekend vindt plaats op vrijdag 5 maart 2021 t/m zondag 7 maart 2021.

Waar Natuurvriendenhuis Krikkenhaar, Krikkenhaar 11, 7627 PA Bornerbroek.

De **kosten** voor dit studieweekend bedragen € 85,- pp. (leden van Esperanto Nederland en NEJ of andere landelijke Esperanto-vereniging betalen € 75,- pp.) In de prijs zijn inbegrepen: lessen, het overige programma, overnachtingen, maaltijden, koffie en thee tussen de lessen.

De **deelnemersbijdrage** van deze bijeenkomst is laag. We willen iedereen een kans geven om deel te nemen. Wil je een extra financiële bijdrage leveren, geef dan aan op het aanmeldingsformulier met wat voor bedrag je de bijeenkomst wil steunen. Elke bijdrage is welkom.

Meer informatie en het aanmeldingsformulier op de website van Esperanto Nederland staan op de website <https://esperanto-nederland.nl/ned/studieweekend/studieweekend.php>



In 2020 hadden we twee studieweekenden en ook nog een studiemiddag gepland. Helaas hebben we deze moeten annuleren omdat het coronavirus in alle hoeken van de wereld rond gaat. Hopelijk kunnen we in 2021 weer starten met onze studieweekenden. We kunnen niet in de toekomst kijken. We blijven optimistisch. Meld je aan als je wilt komen. Als we ook deze bijeenkomst moeten annuleren i.v.m. het coronavirus, dan betalen we je de aanbetaling terug.

*Arjen-Sjoerd, Lilian en Ineke
Organisatie-team studieweekenden*

PostNL
Port betaald
Port payé
Pays-Bas

Fenikso
25a Jarkolekto, n-ro 6
nov. - dec. 2020